

UNIwersYTET IM. ADAMA MICKIEWICZA
UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ

Instruista trejnado

ILEI kaj Edukado.net

Krystyna Grochocka

Esperanto – Sumoo en la lingvolernado

Finlaboraĵo

Temgvidanto

Dr. Katalin Kováts

Poznań - 2020

Enhavo.....	2
1. Enkonduko.....	3
2. Pri la Esperanto-Sumoo.....	4
2.1. Kio estas Esperanto-Sumoo.....	4
2.2. Iniciatinto de Esperanto-Sumoo.....	5
2.3. Historio de Esperanto-Sumoo.....	6
2.4. Partoprenantoj kaj kunlaborantoj.....	7
3. Esperanto-Sumoo en la lingvolernado.....	9
3.1. Esperanto-Sumoo kiel helpilo por plibonigo de lingvoscio.....	9
3.2. Esperanto-Sumoo plibonigas mian lingvokonon – enketo inter legantoj.....	10
3.3. Kion donas al mi Esperanto-Sumoo - intervjuoj kun sumoistoj.....	11
3.4. Rolo de Esperanto-Sumoo en ekkono de Esperanto-literaturo kaj Esperanto-verkistoj.....	17
3.5. Esperanto-Sumoo instigas partoprenantojn al verkado.....	19
4. Populareco de Esperanto-Sumoo en la mondo.....	20
4.1. Esperantaj amaskomunikiloj pri Esperanto-Sumoo.....	20
4.2. Esperanto-Sumoo en diversaj esperantistaj aranĝoj.....	21
4.3. Morala subteno de ILEI.....	22
5. Konkludoj.....	24
6. Enhavo de la apendico.....	25
7. Apendico.....	26
8. Bibliografio.....	37

1. Enkonduko

Ekzistas multaj lerniloj por lingvolernado. La ĉefaj estas lernolibroj. Gravaj estas ankaŭ radioelsendoj, filmoj, sondiskoj. Aktuale grandan rolon plenumas komputilaj programoj kaj interreto.

Bedaŭrinde, pli kaj pli oni forgesas pri tio, kiel grava en la lernado de lingvo estas legado de libroj. Oni legas malpli kaj malpli da libroj, eĉ en la nacia lingvo, kaj legado de libroj en fremda lingvo ŝajnas nenecesa kaj tro malfacila.

Kiam unu el miaj esperantistaj konatoj instigis min al partopreno en Esperanto-Sumoo, mi estis tre skeptika, mi opiniis, ke ĉi tio estas bona konkurso por infanoj kiuj ne ŝatas legi, kaj plenkreska homo mem bone scias kion, kiam kaj kiom devas legi.

Poste mi komprenis, ke tio ne estas vero kaj ĉiu bezonas instigon al legado (precipe en la nuntempa mondo), kaj mi fariĝis partoprenantino de Esperanto-Sumoo.

Baldaŭ mi komencis kunlaboron kun Hori Jasuo (iniciatinto de Esperanto-Sumoo), mi okupiĝas pri la retejo, mi faras diplomojn por venkintoj kaj kompreneble mi ankaŭ legas.

Mi rimarkis, ke ekde kiam mi partoprenas en la Esperanto-Sumoo, mia lingvokono multe pliboniĝis. Mi komprenis, ke Esperanto-Sumoo ne estas nur konkurso por legado kun plezuro, sed ankaŭ grava lernilo en lingvolernado.

La celo de ĉi tiu laboraĵo estas montri kiel la Esperanto-Sumoo helpas en la alproprigo de la lingvo Esperanto.

2. Pri la Esperanto-Sumoo

2.1. Kio estas Esperanto-Sumoo

En la Esperanto-Sumoo simile kiel en la japana tradicia lukto okazas ĉiujare 6 konkursoj en neparaj monatoj: januare, marte, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn. Dum la Sumoo-konkurso partoprenantoj vere luktadas 15 tagoj. Ili ne lukta kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ si mem. E-Luktisto elektas libron, kiun li legos dum la konkurso kaj decidas kiom da paĝoj li legos dum unu tago laŭ sia kapablo. Se li plenumas sian tagan taskon, li notas venkon. Dum Esperanto-Sumoo la luktisto ĉiun kvinan tagon raportas al sia prizorganto pri siaj rezultoj: venkoj aŭ malvenkoj. Venko estos markita per litero "o", malvenko per litero "x" kaj nepartopreno per signo "-". Ĉiuj partoprenantoj estas grupigitaj laŭ 3 rangoj. Luktistoj, kiuj notis 15 venkojn en la antaŭa sumoo, apartenas al rango A- (Jokozuna - la plej alta rango), kaj luktistoj, kiuj ne sukcesis pri tio, apartenas al rango B- (malvenko aŭ nepartopreno en la lasta sumoo), kaj novaj partoprenantoj apartenas al rango C – (novuloj).

Pri aliĝo al la konkurso oni povas ekscii pli sur la paĝo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

La ĉefa celo de la Esperanto-Sumoo estis altigi legkapablon de la esperantistoj kaj kutimigi ilin legi libron kun plezuro.

Tiel skribis iniciatinto de la Esperanto-Sumoo – Hori Jasuo: *

“Paralele kun la Sumoo-konkursoj, vi legu Esperanto-librojn dormantajn en via breto. Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en Sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon”.

* <http://www.esperanto-sumoo.pl/> .

2.2. Inicitinto de Esperanto-Sumoo.



Inicitinto kaj gvidanto de la Esperanto-Sumoo estas HORI Jasuo, universitata instruisto el Japanio.

Li estas konata esperantisto kaj li longe laboris por la movado. Li estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto (1993–2014) kaj UEA (2007–2010), redaktoro de *La Revuo Oriento* kaj poste de *Esperanto en Azio*, prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado en la jaroj 2001–2006. Pro la organizo de la Esperanto-Sumoo, kaj pro la regula verkado kaj eldonado de la libroj *Raportoj el Japanio* li estis elektita “Esperantisto de la Jaro 2018”.

Tiel Hori Jasuo klarigas, kial li komencis Esperanto-Sumoon:*

“Mi estas longjara esperantisto, sed antaŭ ol mi komencis organizi tiun Sumoo-n, mi ĉiam hontis pro mia maldiligenteco pri legado de Esperanto-libroj. Tiun tempon mi estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto, kaj kiam okazis estrarana kunsido en ĝia oficejo en Tokio, mi ĉiam aĉetis plurajn Esperanto-librojn, kaj revenante hejmen per trajno, mi malfermis la librojn kaj komencis legi ilin, sed mi tuj endormiĝis. Post kiam mi revenis hejmen, tiuj libroj tuj kuŝis kaj endormiĝis en mia libroŝranko, kaj neniam vekigis. Mi tre hontis pro tio. Mi sciis, ke samo okazas al multaj esperantistoj. Se ni ne legas librojn, nia Esperanto-kapablo neniam altiĝas, kaj la librokulturo velkas, nome nia senlegado signifas velkadon de Esperanto.”

Por instigi ĉiujn (ankaŭ komencantojn) legi librojn Hori diris: **

“Tiam mi rememoris instruiston de la angla lingvo, kiu havigis al siaj lernantoj memdeciditan celon, nome en ekzameneto maldiligentaj lernantoj rajtis havi celon de eĉ 1 poento el 10 poentoj, male saĝaj lernantoj kuraĝe rajtis havi celon de 10 poentoj. En ekzameneto, kiam tiuj maldiligentuloj gajnis unu poenton, ili ricevis unu blankon (unu venkon), male kiam tiuj saĝuloj gajnis eĉ 9 poentojn, ili ricevis nigron (malvenkon), ĉar ilia celo estis akiro de 10 poentoj. En tiu sistemo malsaĝuloj povis venki saĝulojn. Sciante tion, tiuj malsaĝaj lernantoj serioze preparis sin por ekzamenetoj. Tion raportis tiu instruisto antaŭ 40 jaroj, kaj mi rememoris lin.

* <https://www.liberafolio.org/2020/04/12/sumoo-instigas-al-vekado-de-dormantaj-libroj/>

** <https://www.liberafolio.org/2020/04/12/sumoo-instigas-al-vekado-de-dormantaj-libroj/>

Tiu sistemo egaligas ĉiujn. Kiam ili, ĉu maldiligentuloj kun malaltnivela celo, ĉu saĝuloj kun altnivela celo, atingas sian celon, ili egale akiras unu venkon. Ne gravas, kiaj estas iliaj celoj. Plenumi la celon memdeciditan, ne truditan de alia homo, estas la plej grave. Mi rememoris la manieron de tiu instruisto kaj enkondukis ĝin en Esperanto-Sumoo.”


“Partoprenantoj anoncas, ke ili legos iun libron dum la 15-taga Sumoo-periodo kaj, ekzemple, 3 paĝojn ĉiun tagon. La sistemo estas tre simpla. Laŭ anonco aŭ promeso al si, ili legadas dum la Sumoo, kaj kiam ili plenumas sian promeson en unu tago, ili gajnas unu venkon kaj ne gravas ĉu ili legas 20 paĝojn de filozofia libro aŭ ĉu unu paĝon de infanlibro. Tiamaniere komencantoj kaj veteranoj povas “lukti” dum 15 tagoj sur la sama ringo. Ambaŭ leganto de filozofia libro kaj tiu de infana libro egale ricevas diplomon por perfekta venkinto fine de la Sumoo-periodo. Tial eĉ komencantoj povas ĝoje partopreni en tiu Sumoo.”

2.3. Historio de Esperanto-Sumoo

La unua Esperanto-Sumoo okazis septembre 2009 kaj en ĝi partoprenis nur 18 japanoj. En la dua kaj la tria Sumooj partoprenis ankaŭ nur japanoj. La kvara, en marto 2010, jam estis internacia kaj en ĝi partoprenis 33 E-luktistoj el 9 landoj. Ekde ĉi tiu tempo la Sumooj malfermiĝis al la mondo, kaj havis pli kaj pli da partoprenantoj el diversaj landoj.


La plej multaj luktistoj estis en majo 2017 – 385. Nun partoprenas ilin ĉirkaŭ 300 homoj.

La nombron de partoprenantoj en la Sumooj prezentas suba diagramo.



Dum la jaroj plimultiĝas la nombro de landoj en kiuj loĝas luktistoj, la plej multa okazis en marto 2020 – 38 landoj. Nun la partoprenantoj venas el ĉirkaŭ 35 landoj.

La nombron de landoj el kiuj venas luktistoj prezentas la suba diagramo.



En la jaro 2012 kreiĝis la retejo de E-Sumoo. En ĝi estas prezentataj la rezultojn de ĉiuj Sumooj, ekzemploj de diplomoj, recenzoj de libroj, opinioj de luktistoj, fotoj de luktistoj, regularo de la konkurso, titoloj de libroj legitaj dum la konkurso. La diversaj kaj gravaj informoj pri la E-Sumoo troviĝas sur la ĉefa paĝo. La retejo funkcias ĝis nun. (*Apendico-A1, p.26*)

Ekde la januara Sumoo 2012 ĉiuj partoprenantoj, kiuj venkis, ricevas diplomojn. (*Apendico-A3, p.27*) Dum la luktado ĉirkaŭ 84,1% legorivaloj ricevadas diplomojn, kio signifas, ke ili atingis 15 venkojn.

En la jaro 2015 unu el la luktistoj kreis paĝon pri Esperanto-Sumoo en la libera enciklopedio Vikipedio (*Apendico-A2, p.26*) kaj en la sama jaro li establis novan grupon en fejsbuko por disvastigi la Sumoon.

Ekde septembro 2009 ĝis majo 2020 okazis 63 Esperanto-Sumooj kaj partoprenis en ili 12 225 luktistoj.

2.4. Partoprenantoj kaj kunlaborantoj.

En la Esperanto-Sumoo partoprenas luktistoj el diversaj landoj. Plej ofte japanoj. Multaj devenas el Francio, Koreio, Ĉinio, Pollando, Germanio. Lastatempe estas multe da homoj el Brazilo, Rusio, Vjetnamio, Nepalo. Al la konkurso aliĝas virinoj kaj viroj, junuloj kaj maljunuloj, reprezentatoj de diversaj profesioj. Iuj tre bone konas la lingvon, aliaj estas komencantoj. Estas inter ili homoj konataj pro la agado en la esperanta movado kaj eĉ ŝatataj verkistoj kiel Anna Lowenstein kaj Hori Jasuo. Al la Esperanto-Sumoo aliĝas ankaŭ grupoj: 2 grupoj de junuloj el Japanio, grupo el Koreio kaj Ĉinio, gelernantoj el Seattle (Usono) kaj la plej maljunaj partoprenantoj – la gelernantoj el La Chaux-de-Fonds (Svislando) (*Apendico-*

A4, p.28). Malgraŭ granda diverseco, la luktistojn ligas devo legi esperantajn librojn. Ili ĉiam havas komunan senton, ke en la sama momento, en diversaj lokoj en la mondo estas homoj kiuj ankaŭ legas librojn. Tio kreas solidaran kaj amikan senton inter la partoprenantoj. Multaj legantoj esprimas siajn pozitivajn opiniojn pri Esperanto-Sumoo, kiujn oni povas legi en la retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/opinioj.html> Jen kelkaj:

Nata el Pollando: *“Mi estas feliĉa, ke mi partoprenas en la Esperanto-Sumoo. Dank'al ĝi mi komencis legi librojn, kiuj longe kuŝis sur mia breto. Mi tre dankas pro la diplomoj, kiujn mi ricevis. Partoprenado en la Sumoo estas por mi granda plezuro, tial mi volas denove esti luktistino en venontaj sumooj .”*

Lekanteto el Pollando: *“Mi tre ĝojas, ke mi partoprenis en la Sumoo. Tio ĉi estis mia unua luktado kaj mi legis nur 4 paĝojn ĉiutage. Eble tio ne estas multe sed mi ĝojas, ke mi trovis ĉiutage iom da tempo, ke mi finfine komencis legi la libron, kiun mi ricevis iam donace de mia amiko”.*

Anjo el Hungario: *“Esperanto-Sumoo donis al mi multe da sperto pri regula legado de esperantlingvaj verkoj, ĉu tradukitaj, ĉu originale verkitaj. Mi dankas al vi pro la eblo partopreni en tiu ĉi nobla lego-konkurso, kie ne nur legi pli kutimas ni, sed ankaŭ eblas interŝanĝo de libroj por proponi, konsili al aliaj por legi ilin”.*

Hori Jasuo havas ĉirkaŭ 20 kunlaborantojn en diversaj landoj, kiuj estas ankaŭ luktistoj. Luktistino el Pollando okupiĝas pri la retejo kaj faras la diplomojn. Leganto el Turkio disvastigas la Sumoon en la libera enciklopedio Vikipedio kaj en la fejsbuko. Aliaj t.n. prizorgantoj laboras dum la Esperanto-Sumooj. Ĉiu el ili havas grupon de luktistoj kaj zorgas pri ĝi. La partoprenantoj sendas raportojn pri la legado al siaj prizorgantoj. Sendante la raportojn ili ofte babilas rete pri diversaj temoj. Tio estas tre interesa sperto por ambaŭ flankoj, tial la prizorgantoj tre entuziasme laboras por la Sumoo.

Tiel skribis unu el ili: *

“Mi tre ĝuis labori kiel unu el la prizorgantoj. Mi povis gajni novajn geamikojn de nia sumoo ankaŭ ĉi-foje. Antaŭ ĉio, legi diversajn mesaĝojn el miaj grupanoj kaj skribi miajn respondojn al ili estas tre, tre plezure kaj ĝoje al mi!”

* <http://www.esperanto-sumoo.pl/opinioj.html>

3. Esperanto-Sumoo en la lingvolernado

3.1. Esperanto-Sumoo kiel helpilo por plibonigo de lingvoscio

La ĉefa celo de Esperanto-Sumoo estis evoluigi legokapablon de esperantistoj kaj kutimigi ilin legi librojn. Bonege estus, ke ili legus siajn librojn kun plezuro. Ni jam scias, ke legado estas bona helpilo en lingvolernado. Legado de jarcentoj estas unu el la plej popularaj kaj agrablaj aktivadoj de homo. Ĝi evoluigas pensadon, imagkapablon, ekzercas memoron, pliriĉigas vortprovizon kaj fiksas ortografiajn regulojn. Lerni per legado estas unu el la plej bonaj kaj plej efikaj rimedoj de lernado. Libroj havas pli riĉan lingvaĵon ol tiu kiun ni uzas ĉiutage. Legado kaŭzas tre ofte pligrandigon de nia vortprovizo. Kiam nia enkapo vortaro estos pli riĉa, tiam ni skribos kaj parolos pli bone kaj pli rapide. Legante ni lernas samtempe gramatikon, enmemorigas vortojn kaj frazojn. Dank'al laŭta legado ni praktikas prononcon. Pligrandante nian vortotrezoron ni pli bone scipovas komuniki kun aliaj. Komprenkapablo, parolkapablo, legokapablo kaj skribokapablo – tiuj estas la plej gravaj konoj kiujn ni devas evoluigi dum la lingvolernado. Ĉiuj kvar kapabloj disvolviĝas dum la partopreno en la Esperanto-Sumoo.

Tiel pri evoluigo de siaj lingvokonoj skribis la luktistoj: *

Feliĉa el Vjetnamio: *Mi tre kontentas pri la sumoo. Partopreninte ĝin, mia Esperanto verŝajne iomete pliboniĝis, kaj mi tre ĝojas pro tio.*

Monto Daijuu el Japanio: *Samtempe, mi rimarkis, ke mi povis pli kaj pli facile kompreni la enhavon. Mi ne bezonis traduki frazojn post frazoj en la japanan lingvon, do mi bezonis nur 2~3 horojn en unu tago, kaj nun mi bezonas unu kaj duonhoron por legi 8 paĝojn.*

Benno Lang: *Mi dufoje partoprenis en la Sumoo, kaj subite mi rimarkis, ke mi komprenas preskaŭ ĉion, kaj mi povas legi ion ajn.*

Esploristo el Nepalo: *Fakte sumoo al mi progresiigis mian nivelon de Esperanto. Kiam mi estis 3-monata komencanto, mi havis ŝancon partopreni la sumoon. Tio ege helpis.*

* <http://www.esperanto-sumoo.pl/opinioj.html>

Mirtelo el Nederlando: *Mi ĝuis la legadon dum la Marta Sumoo! La konkurso estis ekstra instigo por mi ĉiutage legi kelkajn paĝojn en Esperanto de libro laŭ mia elekto. Kaj atendas tiom da aliaj verkoj.... Mi spertis ke ĝi kontribuas al pli profunda scio de la lingvo Esperanto, certe kiam oni legas literaturon en kiu estas uzataj maloftajn vortojn kaj esprimojn, preter la ĉiutagaj frazoj kaj diroj. Sed tio ja dependas de la individua lingvoscipovo. Oni legante ekzercas. Tamen mi foje intencas ankaŭ laŭtlegi, por akiri pli fluan elbuŝigon de komplikaj vortoj...*

Ĉimso el DR Kongo: *Jen mi finis mian libron. Antaŭ mi ne povis paroli en Esperanto, sed dank' al E-Sumoo, kun helpo de nia gvidantino, mi kapablas nun paroli esperante.*

Daitoo-dake el Japanio: *Dank' al la E-Sumoo legado en Esperanto iom post iom povos pliboniĝi.*

Elinjo el Francio: *Mi estas prizorgantino en E-Sumoo kaj mi tre ŝatas tiun rendevuon por komuna legadtempo en la mondo. Mi ne ĉiam bone taksas mian legaĵon sed daŭre profitas de ĝi, lernante ion.*

3.2. Esperanto-Sumoo plibonigas mian lingvokonon – enketo inter legantoj

Por pruvi, ke la Esperanto-Sumoo plibonigas la lingvoscion de legantoj mi preparis enketon kaj dissendis ĝin rete al 80 hazarde elektitaj retadreso de sumooistoj. Dum tri tagoj mi ricevis 74 plenumitajn enketojn. (*Apendico-A6, p.29*)

La enketitoj respondis al 14 diversaj demandoj.

Konkludoj de la enketo

72 luktistoj regule partoprenis la Esperanto-Sumoon kaj legis librojn kun plezuro.

57 legantoj ĉiam venkis, 14 ofte, 2 malofte kaj 1 neniam.

La enketo montras, ke la partoprenatoj legante regule, preskaŭ ĉiam venkas kaj ili tre ŝatas legi librojn.


Dum la konkurso 52 enketitoj legas 1–5 paĝojn tage, 16 legas 6–10 paĝojn. Pli ol 10 paĝojn legas 6 personoj.

La respondoj de la enketitoj indikas, ke plej ofte dum la konkurso ili legas 1-5 paĝojn tage.

5 demandoj de enketo rilatis al rolo de la Esperanto-Sumoo en lingvolernado:

71 legantoj respondis, ke la Esperanto-Sumoo plibonigis iliajn legokapablojn, 70 - komprenkapablojn, 57 - skribkapablojn, 45 - parolkapablojn kaj 70 – lingvokononjn.

Tion prezentas la suba diagramo.



Post analizo de la enketo videbliĝas, ke la partoprenatoj de la Esperanto-Sumoo mem rimarkis la pliboniĝon de sia lingvokono, precipe legokapablon kaj komprenkapablon.

3.3. Kion donas al mi Esperanto-Sumoo - intervjuoj kun sumoistoj

Mi intervjuis kelkajn partoprenantojn de la Esperanto-Sumoo. Mi elektis ilin, ĉar ili delonge partoprenas la aranĝon, legas regule, ĉiam venkas kaj ofte skribas recenzojn pri legataj libroj.

Mi sendis rete la demandojn, kaj petis la respondon. Ĉiuj legantoj rapide respondis al miaj demandoj. (*La tekstoj de la intervjuoj estas en originala formo, sen korekto.*)

Intervjuo kun Dorota Burchart el Pollando:

1. Kiel Vi eksciis pri la Esperanto-Sumoo kaj kiel ĉio komenciĝis?

Se mi bone memoras, mi eksciis pri la evento, Esperanto-Sumoo, de Hori Jasuo mem. Li sendis al mi de tempo al tempo diversajn informojn, ankaŭ fotojn.

2. Laŭ mia scio Vi estas fidela legokonkuranto, ĉu Vi povus klarigi pro kio?

Jes, mi tuj aliĝis al tiu grupo. Kial? Ĉar mi ĝenerale ŝatas legi kaj legas multajn librojn. Mi posedas sufiĉe multnombran la propran bibliotekon de esperantaj libroj inter kiuj troviĝis ankoraŭ ne legitaj. Ĉar mi kondutas kvazaŭ avarulo, kiu kolektas (ion) kaj jam kolektado kaj posedo mem prezentas grandan ĝojon, do mi profitis la okazon por dum Esperanto-Sumoo legi tiujn, kiujn mi ankoraŭ ne legis.

3. Ĉu la legado donis al Vi ion? Ĉu Vi povus rakonti pri viaj rimarkoj?

La legado donis al mi simple plezuron kaj kontakton kun la lingvo iasence perfektigis la konon de la lingvo. Permesis ekkoni diversajn stilojn, naciajn influojn en la lingvo. Foje akcepteblaj (de mi), foje laŭ mia opinio dubindaj. Tamen plej multaj legitaj libroj prezentis bonan stilon, seneraran se temas pri gramatiko. Tradukoj ne ĉiam estas perfektaj, precipe multe da malperfektaĵoj, verdire eraroj mi trovis en interesa libro, sed fuŝe tradukita: "Edzino de Einstein". Min interesas ankaŭ kion legas aliaj. Mi eĉ interŝanĝis librojn kun aliaj luktistoj. Iu povas diri, ja vi povas aĉeti la novajn librojn dum UK, en UEA. Tio veras, sed .. iom bremsas min la financoj, alia obstaklo - mi havas multajn librojn kaj ne havas posteulon, kiu interesiĝus pri la afero. Bibliotekoj esperantaj ne multas kaj tiuj, kiuj ekzistas akceptas nur librojn, kiujn ili ankoraŭ ne posedas, plej volonte novajn eldonojn.

4. Vi jam estas longdaŭra partoprenantino de la Esperanto-Sumoo, ĉu Vi povus iom konsili al novaj luktistoj?

Al novaj luktistoj mi nur povus konsili, ke valoras legi. Por komencantoj por perfektigi la lingvon, por progresantoj pro la plezuro legi. Bedaŭrinde mi ne havas talenton konvinki iujn aliajn por legi laŭ reguloj de Esperanto-Sumoo. Mia rumana kolemino respondis, ke ŝi legos kiam ŝi havos emon. La alia, polino, respondis, ke ne plaĉas al ŝi regulo anonci ĉiutage pri la tralegita parto. Nun jam oni anoncas nur trifoje ... sed mi supozas, ke homoj ne ŝatas esti disciplinigitaj. Ankoraŭ aliaj respondis, ke ili ne havas tempon legi. Estas malfacile instigi iun, kiu ne kutimas legi, kiu preferas "bildojn" kaj "parolatan vorton". Sed legante komentoj de sumooanoj, multaj el ili substrekas, ke fine ili tralegis multajn librojn, ke la reguloj de la evento helpas al ili discipliniĝi, do valoras partopreni en tiu plezuriga aranĝo.

Intervjuo kun Edeltraut Henning el Germanio:

1. Kiel Vi eksciis pri la Esperanto-Sumoo kaj kiel ĉio komenciĝis?

Mi jam ĉiam ŝatas legi. Kiam mi eklernis Esperanton, mi ankaŭ legis esperantlingvajn librojn. En iu Esperanto renkonto Aleksander Zdechlik (unu el sumooistoj) parolis pri Esperanto-Sumoo.

2. Laŭ mia scio Vi estas fidela Esperanto-Sumoisto, ĉu Vi povus klarigi pro kio?

La ideo de Hori Jasuo estas grandioza. Ĉar mi preskaŭ ĉiutage legas, mi aliĝis kun helpo de Aleksander al Sumoo. Finfine mi legas miajn librojn el mia libroŝranko. Ĉion libron mi finlegas ankaŭ post la Sumoo. Poste mi pruntedonas aŭ fordonacas la librojn.

3. Ĉu la legado donis al Vi ion? Ĉu Vi povus rakonti pri viaj rimarkoj?

Nur se oni legas, oni lernas novajn vortojn kaj parolmanieron. En persona parolado oni nur uzas konatajn vortojn. Dum kongresoj (aŭ per fejsbuko) oni parolas kun aliaj sumooistoj pri aŭtoroj, pri novaj eldonoj. Dum UK mi ŝatis partopreni " Duonhoron" kun famaj aŭtoroj kaj tie mi ĉiam aĉetis kelkajn librojn. En Sumoo estas bone, ke Hori Jasuo ĉiam memorigas pri la legado.

4. Vi jam estas longdaŭra partoprenantino de la Esperanto-Sumoo, ĉu Vi povus iom konsili al novaj luktistoj?

Mi rekomendas la aranĝon al ĉiuj, kiu ŝatas legi, interesiĝas pri literaturo, volas perfektigi la lingvokonon.

Intervjuo kun Arlette kaj Edmond Plutniak el Francio:

1. Kiel Vi eksciis pri la Esperanto-Sumoo kaj kiel ĉio komenciĝis?

Antaŭ 6 jaroj dum la Eŭropa Esperanto-Rendevuo, kiun ni (mia edzo Edmond kaj mi) organizis ĉiujare en novembro en Stella-Plage, Anne Jausions brile prelegis pri Esperanto-Sumoo. Ni tuj entuziasmiĝis kaj senprobleme partoprenis regule. Komence mia edzo kaj mi legis malsamajn librojn, nun ni legas la saman libron tiel ni povas pridiskuti niajn legaĵojn. Ni sukcesis varbi 8 el niaj klubanoj de Arras. Ili regule legas kun plezuro.

2. Laŭ mia scio Vi estas fidelaj Esperanto-Sumoistoj, ĉu Vi povus klarigi pro kio?

Tiu mirinda kreaĵo de HORI Jasuo permesas regule legi la perlojn de la Esperanto-literaturo kaj helpi ties disvastigon. Ĉu plibonigi la mondon? ...eble!!!

3. Ĉu la legado donis al Vi ion? Ĉu Vi povus rakonti pri viaj rimarkoj?

Certe! Post la legado de la rakontoj de Guy de Maupassant, ni vizitis Normandion dum unu tuta semajno por malkovri la regionon de tiu fama franca verkisto. Post legado de la sola esperanto-libro pri cirko ni travivis dum pluraj tagoj en eta cirko la “cirkanoj” (posedaĵo de la filo de unu el niaj amikoj). Post la legado de la libro “La eta Princo” de Antoine de Saint Exupéry, la ideo venis al mi proponi la nomon “La eta princo” al la lernejo ĵus fin-rekonstruita, en kiu mi laboris dum multaj jaroj. Mi faros tiun proponon en proksima septembro.

4. Vi jam estas longdaŭra partoprenanto de la Esperanto-Sumoo, ĉu Vi povus iom konsili al novaj luktistoj?

Bone elekti la libron kiun oni legas kaj legi tre regule por trovi plezuron en la legado. Regula legado forte helpas alproprigi al si la lingvon kaj progresi. “Tiu kiu ne legas havas nur unu vivon, la leganto travivos cent vivojn!”. Pli regula legado donas bonan sanon, optimismon kaj feliĉon!

Intervjuo kun Jan Vajs el Slovakio

1. Kiel Vi eksciis pri la Esperanto-Sumoo kaj kiel ĉio komenciĝis?

Unuafoje mi aŭdis pri Eo-Sumoo dum la renkontiĝo de vojaĝantoj, kiu estis organizita sub la nomo Poludnica en la jaro 2017. En la programon estis envicigita prelego de Aleksander Zdechlik pri E-Sumoo. Tuj en januaro mi aliĝis al la 44-a Eo-Sumoo. La unua libro legita estis de Trevor Steele – “Neniu ajn papilio”.

2. Laŭ mia scio Vi estas fidela Esperanto-Sumoisto, ĉu Vi povus klarigi pro kio?

De infaneco por mi estis grava legado de libroj. Poste alvenis mia vivetapo, kiam mi malmulte legis, sed post mia emeriteco mi denove multe legas. E-Sumoo estis por mi starto de relegado ankaŭ en Esperanto.

3. Ĉu la legado donis al Vi ion?

Kompreneble, ke jes. Ĝenerale al mi donas legado informojn kaj beletrio alportas ripozon. En E-Sumoo mi preferas legi vojaĝpriskribojn kaj historiajn librojn, de tempo al tempo ankaŭ alian literaturon. Krom tio Esperanto-Sumoo instruas la luktistojn regule legi.

4. Ĉu Vi povus rakonti pri viaj rimarkoj?

Mi povus legi ankaŭ sen E-Sumoo, sed ne tiel regule kiel kun ĝi. Dank'al E-Sumoo mi plenigas mian privatan bibliotekon per faktografia kaj historia literaturo. Hori Jasuo kreis specialan komunumon de „verdaj legantoj“, kiuj povas kompari sian legadon kun aliaj legantoj en la tuta mondo. El praktika uzo bone funkcias tt-paĝo de E-Sumoo, kie speciale por mi estas valora parto kun recenzoj. Recenzoj estas bona gvidilo por elekto de libroj, kiuj mi preferas.

5. Vi jam estas longdaŭra partoprenanto de la Esperanto-Sumoo, ĉu Vi povus iom konsili por novaj luktistoj?

Mi povas konsili al novaj luktistoj, ke komencu per simpla literaturo, kiu respondas al ilia lingvonivelo. Sinsekve ili povas legi pli malfacilajn librojn. La plej ĉefa kondiĉo por regula legado kadre de E-Sumoo estas legado de libroj, kies enhavo estas interesa por leganto.

Intervjuo kun Aleksander Zdechlik el Pollando

1. Kiel Vi eksciis pri la Esperanto-Sumoo kaj kiel ĉio komenciĝis?

Mia longdaŭra esperantoamiko estis kaj estas Hori Jasuo el Japanio. Kiam mi komencis mian vivon en Esperantujo li estis mia unua kaj fidela korespondanto. Kontaktoj kun li estas ĝis nun tre gravaj kaj ili estas ne nur leteraj kaj ankaŭ personaj. Iutage li proponis al mi ke mi partoprenu en aranĝo kiun li elpensis kiel Esperanto-Sumoo. En unua momento mi iomete dubis kaj mi komencis demandi pri la regularo. Laŭ lia respondo neniu kontrolos min kiom da paĝoj mi legos kaj neniun premion mi ricevos se mi venkus. Por mi la respondo de mia amiko estis iom stranga por ne diri pli akre. Mi vivis en lando kie preskaŭ ĉio estis kontrolita kaj mi taksis mian lingvoscion sufiĉe altnivela sed al mia amiko malfacile estis diri ne. Plena de mokaj kaj ironiaj pensoj mi komencis "lukti" tio signifas legi. Post iom da tagoj mi rimarkis, ke mi legas pli rapide. Kiam mi komencis, mi legis 5 paĝojn dum 2 horoj kompreneble uzante vortaron esperanto-polan. Fine mi la saman kvanton da paĝoj legis nur 1 horon kaj kvarono. Kio okazis? Mi rimarkis, ke mia enkapa vortprovizo pligrandiĝis kaj mi fine ne uzis tiom ofte la vortaron. Post sekvaj aranĝoj mi rimarkis, ke libroj kiuj kuŝis sur mia breto kaj kiujn mi neniam plene legis ilin estis tralegitaj. De tiu momento mi estiĝis fano de la aranĝo. Mi jam finis moki kaj finfine mi dankas al mia amiko, ke li proponis tion al mi.

2. Laŭ mia scio Vi estas fidela Esperanto-Sumoisto, ĉu vere kaj se jes, ĉu Vi povus klarigi pro kio?

Jes, Vi pravas mi estas fidela Esperanto-Sumoisto. Mi jam klarigis al Vi kial tio okazis, sed mi rimarkis, ke miaj lingvoscioj pliboniĝis. Kvankam mi komence taksis nivelon de mia lingvoscio sufiĉe alta sed mi eraris kaj nun mia lingvoscio estos sufiĉe pli alta ol antaŭe kaj legante konstante mi ĉiam rimarkas, ke mi ne havas en mia memoro multajn vortojn kiujn mi devus havi. Sed eble tio estas bone, por ke mi uzu en konversacioj vortojn simplajn kaj por ke mi estu komprenata de ĉiuj. Mi ankaŭ estas fidela al la aranĝo ĉar por posedi iun lingvon je iu nivelo homo devas konstante ekzerci. Esperanto-Sumoo donas al mi eblecon ekzerci kaj flegi mian nivelon de lingvoscio.

3. Vi ankaŭ laboras pri la evento kiel prizorganto, ĉu Vi povas diri iom pri Via laboro?

Jes mi laboras kiel prizorganto. S-ro Hori Jasuo proponis al mi, ke mi helpu al li. La aranĝo pligrandiĝis kaj jam partoprenas ĉirkaŭ 400 homoj el la tuta mondo. Do, evidente, ke li ne povas fari ĉion. Se li destinus nur 1 minuton por unu partoprenanto tio jam estus 400 minutoj, tio estus pli ol 6 horoj sen iu paŭzo. Mia tasko estas kunlabori kun 25 partoprenantoj ricevante de ili raportojn. Mi faras mian propran liston kaj sendas ĝin al la Ĉefo. Mi ankaŭ korespondas kun miaj partoprenantoj kaj klarigas al ili pri la regularo. Ne ĉiuj komprenas la regularon. Sed mi vidas, ke multaj e-sumooistoj estas bonkoraj homoj kaj preskaŭ neniam estas konfliktoj. Tiam, kiam la konfliktoj eksplodas tiam denove kiel fajrobrigadisto komencas agi la Ĉefo. Do, mia laboro estas ne nur prilabori la rezultojn sed ankaŭ kontroli la datumojn de la partoprenanto.

4. Vi jam estas longdaŭra partoprenanto de la Esperanto-Sumoo, ĉu Vi povus iom konsili al komencantoj?

Jes, unue mi proponas al ĉiuj esperantistoj, ke ili provu partopreni en la aranĝo. Ili nenion ricevos ion pro la partopreno krom diplomo aŭ iu insigno (ne ofte) sed ili vere ekzercos la lingvon kaj profiton ili vidos poste. Tiuj, kiuj jam estas spertuloj en Esperanto eble nenion novan rimarkos sed ilia partopreno estus bezonata por reklami la aranĝon kaj konstrui prestiĝon por la Lingvo. Nenie en la mondo okazas simila aranĝo pri lingvoinstruado.

Por lingvaj komencantoj, mi proponus elekti simplajn librojn eble fabelojn. Legu komence malmulte da paĝoj sed ĉiam legu kun vortaro. Tiuj komencantoj havos ĝojon pro la

legado. Grave estas, ke ĉiu legu sian libron matene ĉar diversaj tagaj okazaĵoj havos ne malgrandan influon al lia/ŝia sukceso. Do, Esperanto-Sumoo estas por ĉiu esperantisto.

Konkludo de la intervjuo

Ĉiuj miaj interparolantoj ŝatas partoperni en la Esperanto-Sumoo, ili legas librojn kun plezuro. Malgraŭ, ke ili estas spertaj esperantistoj, ili multe profitas de la legokonkurso. Dank'al ĝi ili legas regule, tralegis jam esperantajn librojn kuŝantajn sur iliaj bretoj kaj aĉetis novajn. Esperanto-Sumoo donas al ili eblecon ekzerci kaj flegi iliajn nivelon de lingvoscio. Ili instigas ĉiujn partopreni en la Sumoo, ĉar regula legado helpas alproprigi la lingvon. Al komencantoj ili konsilas legi facilajn librojn kun interesa enhavo.


3.4. Rolo de Esperanto-Sumoo en ekono de Esperanto-literaturo kaj Esperanto-verkistoj

Dum unu Esperanto-Sumoo la partoprenatoj legas pli ol 200 diversajn librojn kaj ĉirkaŭ 20000 paĝojn. Legante tiom multe da libroj, ili devas ekoni multajn esperantajn verkistojn kaj tradukistojn. En la retejo www.esperanto-sumoo.pl estas paĝo "Libroj" en kiu troviĝas titoloj de libroj legitaj dum aktuala Sumoo. Luktistoj povas ĉi tie trovi librojn, kiujn ili legos en sekvaj Sumooj, sed ankaŭ aliaj esperantistoj trovos oportunan libron en ĉi tiu paĝo.

71 enketitoj respondis ke dank'al Esperanto-Sumoo pliboniĝis ilia kono de esperanta literaturo. (*Apendico-A6, p.29*)

Post la analizo de la enketrezultoj de la okazintaj Esperanto-Sumooj mi rimarkis, ke luktistoj preferas beletron, ili legas novelojn, romanojn, poeziaĵojn ktp. Multaj sumoistoj legas librojn kaj tradukitajn kaj ankaŭ originale verkitajn en Esperanto. Popularaj estas verkoj de Hori Jasuo kaj Anna Lowenstein. Plej ofte sumoistoj legas unu libron dum kelkaj konkurseldonoj ĝis la finlego. Okazas ankaŭ, ke dum la Sumoo konkurso la libro finiĝas kaj oni devis komenci legi alian.


Mi ekzamenis kiom da paĝoj tralegis unu sumoisto averaĝe dum unu Esperanto-Sumoo ekde januaro 2012 ĝis majo 2020. La suba diagramo montras, ke plej multe da paĝoj legis averaĝe unu sumooisto en novembro 2013, 93 paĝojn. Malpli legis luktistoj ekde majo 2016 ĝis majo 2020, 60 paĝojn.



Mi rimarkis, ke en la unuaj Esperanto-Sumooj luktistoj legis pli multajn paĝojn ol aktuale. La legokonkurso nun multe disvastiĝis, kaj partoprenas en ĝi ne nur lertaj esperantistoj sed ankaŭ komencantoj. Ĉi tio montras, ke Esperanto-Sumoo estas por ĉiuj.

La vera trezoro por popularigi esperantan literaturon estas skribitaj de luktistoj recenzoj pri legitaj libroj. La recenzoj aperadas ekde septembro 2013 kaj estas disponigitaj al ĉiuj en la retejo www.esperanto-sumoo.pl. Dum la jaroj legantoj skribas pli kaj pli da recenzoj.

La diagramo montras la nombron de recenzoj skribitaj dum la Esperanto-Sumooj.



En enketo 7 personoj respondis, ke ĉiam skribas recenzojn, 13 – ofte, 37- malofte, 17 – neniam. (Apendico-A6, p.29)

La recenzoj estas diversaj, unuaj interesaj, aliaj malpli, ilia kvalito dependas de lingvokapabloj de la aŭtoro. Malgraŭ ĉio, dank'al recenzoj ni povas ion eksci pri libroj kaj elekti ĝustajn por legi. Skribado de recenzoj estas ankaŭ bona lingva ekzerco, ĝi plibonigas la skribokapablon kaj riĉigas vortprovizon.

Laŭ la enketo 53 partoprenantoj legas librojn de sur la propra breto, 24 aĉetas, 21 el interreto kaj 12 prunteprenas de aliaj aŭ el biblioteko. (*Apendico-A6, p.29*)

Longe la partoprenantoj legis librojn dormintajn sur iliaj bretoj, sed kiam ili finis legi tiujn librojn ili aĉetas aŭ prunteprenas la novajn, tiel legantoj ekkonas novajn verkojn kaj verkistojn.

Hori Jasuo diris:*

Mi estas verkisto. Mi verkas kaj eldonas, sed se esperantistoj ne legas miajn librojn, mia verkista laboro estas tute senutila. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj verkistoj ĝojas pro la Sumoo.

Do ni povas diri, ke la Esperanto-Sumoo kaŭzas evoluigon de esperanta literaturo, ĉar ĝi motivas verkistojn al verkado.

3.5. Esperanto-Sumoo instigas partoprenantojn al verkado

La partoprenantoj multe altigas la nivelon de skribokapablo, ĉar Esperanto-Sumoo instigas ilin al verkado. Ili skribis ne nur recenzojn de legitaj libroj.

Luktistino Dirce Sales el Brazilo verkis interesan rakonton pri Esperanto-Sumoo „La bona luktisto” (*Apendico-A8, p.30*) kaj kanteton “Alvoko al samideano: Hori Jasuo” (*Apendico-A7, p.29*).

Unu el luktistinoj faris mapon pri urboj de sumoistoj. (*Apendico-A5, p. 28*). Evidentiĝis, ke iliaj urboj estas en la tuta mondo, sed oni ne scias kiel ili aspektas. Tial en la kapo de Hori Jasuo naskiĝis penso eldoni la libron pri urboj de luktistoj. Baldaŭ eldonejo “Horizonto” en Japanio eldonos libron “Urboj de Esperanto-sumooistoj tra la mondo” (*Apendico-A9, p.31*). Ĉi tiun libron redaktis luktistino ARASE Sajuki el Japanio. La libro kolektas 30 eseojn verkitaĵojn de 30 sumoistoj. Ĉiu eseo priskribas alian urbon kaj havas belajn fotojn. Laŭ mia opinio la libro estas interesa gvidlibro tra la mondo.

*<https://www.liberafolio.org/2020/04/12/sumoo-instigas-al-vekado-de-dormantaj-libroj/>

4. Populareco de Esperanto-Sumoo en la mondo

4.1. Esperantaj amaskomunikiloj pri Esperanto-Sumoo

Populareco de Esperanto-Sumoo rapide kreskas en la mondo. Oni povas legi pri ĝi en diversaj esperantaj revuoj:

Informo pri Esperanto-Sumoo aperis en 2012, en la 6-a numero de *Pola Esperantisto* kaj en marto 2013, en *La Espero*.

Januare 2014 en *La Revuo Orienta* Hori Jasuo invitis al legado dum Sumoo.

Madzy van der Kooij verkis artikolon por *Nederlanda Revuo* en kiu ŝi priskribis sian aventuron kun Esperanto-Sumoo, kaj instigis siajn samlandanojn partopreni en ĝi.

Pri la rezulto de novembra Esperanto-Sumoo 2014 okazis dulingva (esperanta kaj vjetnama) artikolo en *Verda Mesaĝo el Vjetnamio*.

En la 2-a numero 2019 de *Esperantisto Slovaka* luktistino Mária Václavjaková skribis, ke legado en Esperanto-Sumoo helpis al ŝi forgesi malfacilaĵojn de la vivo.

En *Le Monde de l'Esperanto* Arlette kaj Edmond Plutniak skribis interesan artikolon kiel Esperanto-Sumoo permesis al ili travivi interesajn renkontiĝojn en cirkoparko.

Regule artikoloj pri Sumoo aperas en la revuo *Turka Stelo*.

En la 2-a numero 2019 de *La Ondo de Esperanto* aperis intervjuo kun Hori Jasuo kiu parolis pri Esperanto-Sumoo.

En la hejmpaĝo de Ĉina Radio Internacia, la 19-an de novembro 2014 estis artikolo de Ĝoja “Esperanto-Sumoo por nia brila estonteco”.

Ne mankas informoj pri la Sumoo ankaŭ en esperantaj radioj:

Pola RetRadio de tempo al tempo informas siajn aŭskultantojn pri laŭvicaj Esperanto-Sumooj. La 15-an de decembro 2017 okaze de Tago de la E-libro Pola RetRadio gastis la sumoistinon kiu interparolis kun redaktorino Barbara Pietrzak pri la Esperanto-Sumoo.

Ĉina Radio Internacia dum la UK en Bona Aero faris intervjuon kun Hori Jasuo pri la Sumoo kaj dum la UK en Nitra raporton pri la Sumoo-kunsido.

En Esperanta Retradio oni povis aŭdi kvar sonartikolojn popularigantajn Esperanto-Sumoo: “La valora programo Esperanto-Sumoo”, “Legado kaj feliĉo”, “La projekto Esperanto-Sumoo efike subtenas librolegadon” kaj “Legu librojn dum la pandemio”.

En la paĝo: <http://sezonoj.ru/2018/12/hori/> aperis artikolo „Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018”.

Sur multaj ttt-paĝoj troviĝas ligilo al la retejo de Esperanto-Sumoo.

4.2. Esperanto-Sumoo en diversaj esperantistaj aranĝoj

Julie 2015 en Pekino sinjorino YU Jianchao, membro de Pekina Esperanto-Asocio faris prelegon titolitan "Legado, Sumoo, Esperanto". Ŝi tre laŭdas la ideon de la iniciatinto Hori Yasuo pri la Esperanto-Sumoo: “Altigi la legkapablon de esperantistoj kaj kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo” (*Apendico-A10, p.32*).

Novembre 2015 en Stella-plage apud Bulonjo-ĉe-Maró dum la 27a Eŭropa Renkontiĝo okazis ateliero pri Esperanto-Sumoo gvidata de Anne Jausions. Ŝi klarigis la regulojn de la Sumoo kaj venis kun kofroj da libroj, por ke la ĉeestantoj povu trafoliumi aŭ enŝovi la nazon en ilin. Kelkaj el la ĉeestantoj jam delonge partoprenas en la Esperanto-Sumoo, kaj parolis bele pri siaj legaĵoj (*Apendico-A11, p.32*).

Dum la ceremonio de la 60-jariĝo de Vjetnama Esperanto-Asocio sumoistoj ricevis diplomojn de la Esperanto-Sumoo (*Apendico-A12, p.33*).

Hori Jasuo kaj luktisto Monto Urso sendis kristnaskajn donacojn al la gelernantoj de La Chaux-de-Fonds (Svislando) dankante pro la partopreno en Sumoo kaj laŭdante iliajn bonajn rezultojn. Hori Jasuo skribis iliajn nomojn en la japanaj literoj kaj Monto Urso faris belajn paperajn rozojn (*Apendico-A13, p.33*).

Luktistino Fonto prelegis pri Sumoo dum la BEL-Konferenco en la urbo Petropolis, Rio de Janeiro, Brazilo. Ŝi sukcesis entuziasmigi plurajn personojn membriĝi en la projekto (*Apendico-A14, p.34*).

Ekde 2012 dum la Universalaj Kongresoj okazas regulare kunsidoj de sumoistoj organizataj de Hori Jasuo. En ili partoprenas sumoistoj kiuj renkontiĝas persone, parolas pri sia vivo, pri lagataj libroj ktp. La kunsidoj okazas ĉiam en tre bona etoso, same kiel en la renkontiĝo de malnovaj amikoj el lernejaj tagoj. En tiuj renkontiĝoj partoprenas ankaŭ

esperantistoj kiuj ne legas en la Sumoo kaj ofte poste fariĝas luktistoj. Dum la lastaj UK – oj okazis 6-taga Esperanto-Sumoo (*Apendico-A15, p.34*), (*Apendico-A16, 17, p.35*), (*Apendico-A18, p.36*)

4.3. Morala subteno de ILEI

ILEI subtenas Esperanto-Sumoon. Jen mesaĝo de Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI: *”ILEI subtenas “**Esperanto-Sumoo**”-n. Tiu agado estas faro de HORI Jasuo el Japanio. Ĝi celas stimuli la legadon de Eo-libroj. La partoprenantoj aliĝas, decidas pri kion ili legos kaj kiom da paĝojn tage ili legos. Ili mem konstatas, ĉu ili plenumis tion jes aŭ ne. Se jes ili ricevas atestilon. Tiu agado kongruas kun la celoj de ILEI, pro tio la estraro de ILEI decidis morale subteni tiun agadon. Tiu apogo konsistas el kvar aspektoj: artikolo pria en IPR, mencio pria en nia retejo, vastskala anonco al nia membraro la 9an de novembro, aldono de mencio de ILEI sur la atestiloj “Kun morala subteno de ILEI kaj elkoraj gratuloj de **ĝia estraro**”.*

En la jaro 2016 ILEI skribis gratulleteron:

“Altestimata HORI san!

Aperis statistiko pri la novembra SUMOO, kun mirinde alta partoprenantonombro.

ILEI gratulas vin.

Vi elektis tre interesan strategion por atingi, ke homoj legu libron. Kopiante la strukturon de la sumoo-ĉampionado en Japanio (sesfoje jare ili konkuras dum du semajnoj), vi imagis la saman kalendaron kaj sugestas al esperantistoj lukti kontraŭ si mem legante libron laŭ la mem decidita ritmo. Neniu devas lukti kontraŭ dika peza sumoisto, neniu devas ŝviti, neniu riskas vundiĝi, nur legi la libron, kiun la leganto mem elektis. Ruza maniero! Plie vi prizorgas precizan kolekton de la rezultoj kaj analizon de tiuj ciferoj. Kaj fine vi trovis helpantojn por rilati kun la plurcentoj da legantoj kaj kuraĝigi ilin dum la legado.

ILEI aŭspicias la Esperanto-Sumoon kaj feliĉas pri ĝia ekzisto. Evidente la celo de Sumoo kongruas kun la celoj de ILEI.

La Esperanto SUMOO estas via eltrovitaĵo, via “bebo”. Admirinda afero en daŭra kresko. Gratulon denove! Vi rajtas fieri pri via ideo.”

Mireille Grosjean, Prez de ILEI”

Fonto: www.esperanto-sumoo.pl

Radojica Petroviĉ el Serbio, Estrarano pri kongresoj de ILEI sendis ĉi tiun mesaĝon:

“Karaj,

Jen plia kialo por gratuli s-ron HORI Jasuo pro lia longdaŭre sukcesa projekto de Internacia Esperanto-sumoo, tiom grava por la kulturo de Esperanto. ILEI jam plurfoje esprimis sian subtenon kaj, inspirita de tiu projekto, enkondukis novan programeron – Literaturan Kafejon – en programon de siaj kongresoj. La 51-a Kongreso de ILEI kaj 77-a Hispana Kongreso de Esperanto kun la komuna ĉeftemo “La kultura heredaĵo de Esperanto” estos bona loko por renkontiĝo de Esperanto-sumooanoj kaj interŝanĝo de iliaj spertoj kaj impresoj.”

5. Konkludoj

La celo de mia laboraĵo estis montri, ke la Esperanto-Sumoo ludas rolon en la lernado de Esperanto, kaj ankaŭ ke oni povas diri, ke ĝi estas unu el la lerniloj por lernado de la lingvo.

Antaŭ la kreado de ĉi tiu laboraĵo, kiel sumoistino, mi mem rimarkis plibonigon de mia lingvokono, tial mi volus pruvi, ke tio estas vero. Mi tralegis en la retejo: www.esperanto-sumoo.pl opiniojn de la luktistoj, 74 partoprenantoj de Esperanto-Sumoo plenumis la enketon kaj mi interparolis kun 6 regule legantaj sumoistoj. Ĉiuj konsentis, ke partoprenado en la legokonkurso havas grandan influon je la lingvokono: pliriĉigas vortprovizon, fiksas gramatikon, faciligas lingvokomprenon, profundigas la scion pri literaturo.

Tiel valoras emfazi, ke ne nur la partoprenantoj agnoskas la kvalitojn de la Esperanto-Sumoo, sed ankaŭ ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Agado por la Esperanto-Sumoo kongruas kun ĝiaj celoj, pro tio la estraro de ILEI decidis morale subteni tiun agadon.

Sur la diplomoj de venkintoj estas videbla skribaĵo: “Kun morala subteno de ILEI”.

Mireille Grosjean - prezidantino de ILEI diris, ke: “*ILEI aŭspicias la Esperanto-Sumoon kaj feliĉas pri ĝia ekzisto*”.

Mi opinias, ke multaj esperantistoj feliĉas pri ĝia ekzisto, ĉar la Esperanto-Sumoo multe kontribuas ankaŭ al la esperanta kulturo kaj movado.


*Mi pensas, ke mi povas en la nomo de ĉiuj sumoistoj danki al **Hori Jasuo** – iniciatinto de la plej granda legokonkurso en la E-komunumo.*

Enhavo de la apendico

A1. Retejo de la Esperanto-Sumoo	26
A2. Vikipedia paĝo de la Esperanto-Sumoo	26
A3. Diplomo	27
A4. Lernantoj el La Chaux-de-Fonds (Svislando).....	28
A5. Mapo kun urboj de sumoistoj	28
A.6. Enketo	29
A7. Dirce Sales: Teksto de kanto	29
A8. Dirce Sales: <i>La bona luktisto</i>	30
A9. Kovrilo de libro	31
A10. Prelego en Pekino.....	32
A11. Esperanto-Sumoo en Stella-plage.....	32
A12. Vjetnama Esperanto-Asocio.....	33
A13. Gelernantoj de La Chaux-de-Fonds	33
A14. BEL-Konferenco en Brazilo	34
A15. UK en Lillo.....	34
A16. UK en Seulo.....	35
A17. UK en Lisbono	35
A18. UK en Lahtio.....	36
A19. Emblemo de la Esperanto-Sumoo.....	36


6. Apendico

A1. Retejo de la Esperanto-Sumoo : <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A2. Wikipedia paĝo de la Esperanto-Sumoo

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo



ESPERANTO-SUMOO
Kun morala subteno de ILEI



Diplomo
al

En la 58a Esperanto-Sumoo okazinta inter
la 12a kaj la 26a de majo 2019
vi akiris perfektan triumfon kun plenaj 15 venkoj.
Ni honoras vin per tiu ĉi diplomo.

Via luktado


Libro:
Legad-kvanto:

La 26an de majo 2019
Komitatestro de Esperanto-Sumoo HORI Jasuo

A4. Lernantoj el La Chaux-de-Fonds (Svislando): <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A5. Mapo kun urboj de sumoistoj: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A.6. Enketo

Enketo

Kara luktistoj, mi partoprenas la instruistan trejnadon en Poznań (Pollando).

Mi skribas studfinan laboraĵon pri Esperanto-Sumoo. Bonvolu plenumi suban enketon kaj sendu ĝin al mia retadreso: krystynagrochocka@o2.pl aŭ al HORI Jasuo.

Mi dankas anticipe

Krystyna Grochocka

Lando el kiu vi devenas

En kiu jaro vi komencis partopreni la Esperanto-Sumoon

Ĉu vi partoprenas en la Sumoo regule (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Kiom da paĝoj vi legas tage (elektu ĝustan): **1 – 5 p.** **6 – 10 p.** **pli ol 10 p.**

Ĉu vi legas la libron kun ĝojo (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu Esperanto-Sumoo plibonigis vian legokapablon: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu Esperanto-Sumoo plibonigis vian komprenkapablon: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu Esperanto-Sumoo plibonigis vian skribkapablon: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu Esperanto-Sumoo plibonigis vian parolkapablon: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu Esperanto-Sumoo plibonigis vian lingvokonon: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Ĉu la Sumoo plibonigis vian konon de la esperanta literaturo: (elektu ĝustan): **jes** **ne**

Mi venkis en la Sumoo (elektu ĝustan): **ĉiam** **ofte** **malofte** **neniam**

Mi skribis recenzojn pri la libroj (elektu ĝustan): **ĉiam** **ofte** **malofte** **neniam**

De kie vi prenas la librojn (elektu ĝustan):

de mia breto **mi aĉetas** **mi prunteprenas de geamikoj** **de Interreto**

A7. Dirce Sales: Teksto de kanto: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Alvoko al samideano: Hori Jasuo

En ĉiu dua monato

herolde jen Jasuo,

el japana lando

por ke ni transpasos

la internajn murojn. (2)


Alvokante nin

Al la sumoo literaturo!

La bona luktisto

- Vekiĝu, knabo! Jen la horo de la lukto.
Kaj Horizonte frotis la okulojn, ne bone komprenante pri kia lukto li, la Bona Genio, parolis.
- Mi estas laca! Lasu min dormi plu...
- Vekiĝu!
- Mi volas dormi!
- Ne prokrastu. Vekiĝu!
Kaj la knabo, ankoraŭ trenante la liton surdorse, laŭlitere, oscedanta, kaj malvolonte, obeis.
- Akompanu min vi!
Kaj stranga surprizo atendis la knabon en la granda ludsalono...
La oponentoj liaj estis kvadrataj aŭ rektangulaj entoj!
Iuj estis dikaj kaj malaltaj, aliaj, maldikaj kaj altaj, kaj la plej ŝoka afero temis pri la fakto, ke ili, kvankam mutaj kaj silentaj, multe parolis! Foje, eĉ kriis!
Kaj la plimulto insiste lin defiis:
- Luktu! Luktu!
Kaj Horizonte, tiel perturbita, fermis la pugnojn kaj etendis la brakojn, obeante tiujn frenezajn, strangajn ordonojn.
- Vi devos lukti alimaniere, Horizonte! Ĉu vi ne rimarkis, ke viaj oponentoj ne havas brakojn nek kruojn? Tiel avertis la Bona Genio
- Do kiel mi luktos?! Kriis la knabo, tute perdita ene de tiu situacio.
- Vekiĝu, knabo! Vi bezonas iri al la lernejo!
Venis al li la patrina voĉo, al kiu li kore dankis, pro la liberigo de tiu terura premsonĝo.
En la lernejo, li ne sukcesis sufiĉan lertecon por plenumi la taskojn, kompreneble, sed nur li sciis la kialon.
Ĉar libroj lin endormigis, la instruistino severe lin admonis.
Nokte, denove la Bona Genio lin kondukis en la ludsalonon kaj denove li estis invitita lukti kun tiuj strangaj entoj.
Lia deziro estis forkuri, plori, sed li hontis tion fari.
Li estis valora knabo kaj certe lia Bona Genio ne forlasus lin.
Subite, la entoj sidiĝis ĉirkaŭe kaj antaŭ li aperis granda spegulo, kiu alportis sablan horloĝon kaj ĝin deponis sur la planko de la granda salono.
Horizonto ne plu detenis sin de larmoj, kaj ĉi-foje li kaŝis la vizaĝon inter la manoj kaj singultis kortuŝe ĝis li estis venkita de granda laceco...
Li do, malrapide, levis la kapon kaj perceptis, ke ĉiuj rigardis lin, kvazaŭ li estus la plej stranga estulo de la mondo!
Kia ridinda situacio! Kial mi ne sukcesas foriri el tiu freneza loko? Pensis li.
- Ĉiuj grandaj lecionoj venas al ni per simboloj, Horizonte, diris la Bona Genio.
- Sed kial mi komprenas nenion?
- Mi eksplikos: la spegulo montras al vi la nuran personon, kiu estas kapabla venki ĉiujn malfacilaĵojn de la vivo, kiu estas vi mem!
La horloĝo montras la tempon, kiu estas vera trezoro en nia vivo.

Urboj de Esperanto-Sumooistoj tra la Mondo



Horizonto

A10. Prelego en Pekino: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A11. Esperanto-Sumoo en Stella-plage: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A12. Vjetnama Esperanto-Asocio: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A13. Gelernantoj de La Chaux-de-Fonds: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A14. BEL-Konferenco en Brazilo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A15. UK en Lillo (*La longa blanka papero sur la planko estas la listo de la sumooistoj.*)
<http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A16. UK en Seulo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A17. UK en Lisbono: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A18. UK en Lahtio: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



A19. Emblemo de la Esperanto-Sumoo (projektis Krystyna Grochocka)



7. Bibliografio

- Kováts, Katalin 2009: *Manlibro pri instruado de Esperanto*. Hago, Nederlando, ILEI
- Arase, Sajuki 2017: *Urboj de Esperanto-sumooistoj tra la mondo*. Japanio, eldonejo: Horizonte
- Hori, Jasuo 2013: Sukcese finiĝis la Internacia Esperanto-Sumo. En: La Espero 2013/3
- Arlette kaj Edmond Plutniak: De Esperanto-Sumoo ĝis cirkotendo kaj ankoraŭ plu... En: Le Monde de l'Esperanto
- Hori, Jasuo 2014: Invito al Esperanto-sumoo, konkurso por legi esperantajn librojn: En: La Revuo Orienta 2014/1
- Van de Kooij, Madzy 2014: Mi jam du foje luktis.... . En: Nederlanda Revuo 2014
- Fischer-Kotowski, Paweł 2019: Intervjuo kun Hori Jasuo. En: La Ondo de Esperanto 2019/2
- Václavjaková, Maria 2019: Esperanto-Sumoo. En: Esperantisto Slovaka 2019/2
- Esperanto-Sumoo. <http://www.esperanto-sumoo.pl/>
- Vikipedio. https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo
- Facebooko. <https://www.facebook.com/groups/759066970888217/>
- Pola RetRadio: <http://pola-retradio.org/antau-la-mikrofo/pago-3/>
- Esperanta Retradio. <http://esperantaretradio.blogspot.com/search?q=sumoo>
- Libera Folio: <https://www.liberafolio.org/2020/04/12/sumoo-instigas-al-vekado-de-dormantaj-libroj/>